# *Venezuelo denuncas anta? UN konfiskon de Citgo*




Karakaso, maj 3 (RHK) Venezuelo denuncis marde la sankciojn truditajn de la Usona Registaro anta? la Ekonomia kaj Socia Konsilio de la Unui?intaj Nacioj (UN), precipe la konfiskon de Citgo, la filio de Petroloj de Venezuelo S.A. (PDVSA) situanta en usona teritorio.

Dum kunveno de la Konsilio pri la 16-a Celo de UN, kiu provas anta?enigi justajn, pacajn kaj inkluzivajn sociojn, la deputito Konstanta Reprezentanto de Venezuelo ?e UN, Joaquín Pérez Ayestarán, emfazis la firman enga?i?on de sia lando al travidebleco.

Krome, per la oficiala Tviter-konto de la konstanta misio de Venezuelo al UN, Pérez Ayestarán atentigis, ke "unuflankaj trudiniciatoj kaj la provo konfiski naciajn hava?ojn, kiel la kompanio Citgo, konsistigas la maksimuman esprimon de korupto, kaj  reprezentas krimajn agojn kaj duoblajn normojn en la batalo kontra? tiu plago".

Dum la okazigo de la evento por la Tago de la Laboro, la prezidento de Venezuelo, Nicolás Maduro, esprimis sian indignon pri tio, kion li konsideras ?telo fare de la usona registaro kaj la opozicia Unuiga Platformo de Venezuelo.

Prezidento Maduro klarigis, ke Citgo generas jarajn profitojn de pli ol 1,000 milionoj da dolaroj kaj havas pli ol 10,000 benzinpumpilojn en Usono. "Ni venkos ?i tiun konspiron, ni venkos ?i tiun konspiron, ni

denove sukcesos ", li deklaris anta? homamaso.

Fonto: Telesur

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/321499-venezuelo-denuncas-antau-un-konfiskon-de-citgo

**Radio Habana Cuba**